La prunarbo
(A szilvafa)

Unua jaro, ke la prunarbo fruktis.
Regalas min kun grandkernaj, etaj,
alungustaj, trofruaj fruktoj.
Nemangheblaj.

Printempe mi elhakos.
Restos pli da loko por la solidago,
kaj la siringo kreskigos floregojn.

Printempe mi elhakos.
Se ghi ne estos, do mi devos
nek shpruci, nek sterki,
kvankam mi faris dek jarojn longe.

Se mi elhakos printempe,
ghia trunketo kaj la blankaj floroj
aperantaj printempe,
la folioj autune flavantaj
ne signos la tempon.
Kaj la flava solidago,
la rozkolorflora pomarbo
staros sola sur deklivo de la monteto.
Inter ghia foliaro ne flirtos
bunta papilio,
ne surflugos birdo
por ripozi.
Ne estos fruktoatenda somero,
fruktosekiga autuno
kaj la vintrajn branchojn ne premos negho

Se printempe mi elhakos…..

Tradukita de János Ruff